# Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 9-an de Oktobro 2023

**Ĉeestantoj *(zome pro la milita stato)***: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Inbar Mor, Ŝlomo Ŝaĥar, Eran Yuval-Vodevoz, Gabi Zeevi; ***je la fino***: Amri Wandel (Azerbajĝano).

***Protokolo** de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.*

## 1. Raportoj (Jehoŝua)

a) **Eran** havas novan adreson (ankaŭ ĝi estas en Givatajim).
b) En la ĵus finiĝinta kunveno partoprenis **14**, **6** el ili eksterlandanoj – delonge ne-vidita rekordo!

## 2. Magazeno por la libroj de ELI (Ŝlomo)

La kibuco ne luigas almenaŭ ĝis la fino de la jaro. Ĉu akumuli la librojn en nia oficejo (sen bretoj), kiel ili estas pakitaj nun? **Propono**: ni pritraktu kune kun **Amri** en la venonta kunsido.

## 3. Buĝetpropono por 2024 (Ŝlomo)

La detala propono estas montrata sur la ekranoj, kun kelkaj tajp-eraroj korektotaj. La atendata enspezo pro membro-kotizoj estos korektita al 4,000 NIS, ĉar tre malmultaj pagis ĝis nun, kaj **Jehoŝua** telefonos al la nepagintoj individue. **Dror**: Ni devas konsideri kaj aldoni interret-elspezojn, por domajno, ktp.

## 4. Israela Esperantisto (Mikaelo)

**Jehoŝua**: nun estas tiom multe da tarifoj por dissendi la bultenon al diversaj adresoj, ke ni devas scii, kiel sendi, kaj tamen gajni la rabaton. Mi devos iri al la poŝtoficejo nur por demandi. **Mikaelo**: Mi estos hejme ĝis la 22-a de Oktobro, kaj revenos nur la 15-an de Novembro. **Jehoŝua**: do mi devas esplori, kaj dissendi antaŭ la 22-a!

## 5. La Zamenhofa Vespero (Jehoŝua)

**Jehoŝua: ĝ**i estu lunde, la 18-an de Decembro, je 17h45; la programo ekde la 18h00. Ĝi okazos hibride en la Alon-turo II kaj zome. **Ŝlomo** havos ion por diskuti kaj voĉdonigi, **Inbar** kantos en E-o, kaj mi serĉas pliajn volontulojn por la arta parto.

## 6. La Israela Kongreso – Aprilo 2024 (Jehoŝua)

Eblas okazigi ĝin de ĵaŭdo ĝis dimanĉo (**trinokte**, pro pli komforta hejmenveturo dimanĉe antaŭtagmeze per publika transporto), dum unu el la du semajnfinoj: 4-a ĝis 7-a, aŭ 11-a ĝis 14-a de Aprilo (la Pasko komenciĝas la 22-an). Ni devas elekti inter du eblecoj: Dimona aŭ Jeruĥam. La hotelo "***Clilei Midbar***" en Dimona (antaŭe "Melon Draĥim" povas akcepti nin NUR en la unuaj datoj, ĝi havas matenmanĝon, kunvensalonon kun ĉio necesa – sed nenio marĉandeblas! La prezo por dulita ĉambro estas ĵaŭde kaj sabate 650 NIS, vendrede duobliĝas, ĉar la vespermanĝo estas deviga kaj krome estas organizita kantvespero (kio taŭgas ankaŭ por ni). Ĉio ĉi kreas tro altan prezon: 2,600 NIS por du personoj por tri noktoj! La hotelo "***Irus***

**2/…**

***Hamidbar***" ne povis respondi nun al niaj demandoj pro la situacio, sed promesis baldaŭan reagon. **Jehoŝua** intencas veturi al ambaŭ per publika transporto, vidi la kondiĉojn propraokule, nepre ankoraŭ ĉi-monate, ĉar ni volas jam informi kaj varbi. Kvankam nun la koncerna trajnstacio estas fermita pro la milito. Ni atendu…

**La venonta kunsido**: lunde, la 6-an de Novembro 2023, je la 20h00

*Protokolis:* ***Gabi Zeevi***